# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 2. Nro 5 DECEMBRO 1949

*Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas.* Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda sed ne deviga.
El Bulonja Deklaracio)

*D-ro Milo Ječný*

## LA INTERNACIA SITUACIO KAJ LA TFS

La malvenko de la faŝistaj ŝtatoj en la dua mondmilito, kies karaktero estas difinita precipe per liberiga movado en la okupaciitaj kaj subpremataj landoj kaj per la decida rolo, kiun ludis Soveta Unio, kaŭzis ŝanĝon en la rilato inter la du hodiaŭ regantaj sistemoj, inter kapitalismo kaj socialismo. Tiu ĉi ŝanĝo signifas senduban plifortiĝon de la socialista sistemo.

La liberiga batalo direktata sub egido de la venkanta Ruĝa Armeo, findecidis la malvenkon de Germanio kaj Japanio, kiuj estis servontaj al la usonaj, britaj kaj francaj kapitalistoj kontraŭ USSR, kontraŭ la sindikataj movadoj kaj kontraŭ aliaj movadoj demokrataj. Tio estas unu el la esencaj ŝanĝoj en la rilato inter la diritaj sistemoj. La alia kaŭzo estas la naskiĝo de popol-demokrataj ŝtatoj, kiuj donis al la kapitalismo mortigan baton per enkonduko de biena reformo, per naciigo, planado, starigo de popola administrado ktp. La bloko de la imperialistaj ŝtatoj estis rimarkinde malfortigita. La kolonia potenco estis forte skuita, kaj en la revolucia tutmonda proceso ekokupis la kolonioj kaj la duonkolonioj gravan pozicion. Ilia liberiga batalo kontribuas grandmezure al detruado de la kapitalista, imperialista tendaro. En la tuta mondo ekzistas fortoj revoluciaj, fontantaj el la batalo de laborulaj klasoj por ekonomia, sociala kaj nacia memstareco, kaj fortoj de imperialistaj subpremo kaj ekspluatado.

La mondmilito malintensigis por kelka tempo la evidentajn malakordojn, kiuj dividas la kapitalistan sistemon disde la socialista. La ekonomia problemaro, de Usono kaj la forkliniĝo disde la izolisma politiko esprimita per la devizo „Usonon al Usonanoj" ĝis la plej ekstremaj konsekvencoj de politiko konkera, ekspansia, manifestiĝanta per imperialisma trudaspiro al tutmondaj debitejoj kaj al eksterlanda produktado industria kaj terkultura, baldaŭ tamen dividis la mondon je du malsamaj tendaroj: je la tendaro kontraŭimperialisma kaj demokrata, kaj la kontraŭdemokrata kaj imperialisma. La celo de la lastenomita tendaro estas plifortigi la imperialismon, eksplodigi novan imperialisman militon, subpremi la socialisman strebadon kaj subteni la reakcion, eĉ se temus pri pli fruaj kontraŭuloj, kiaj estas la kapitalistoj en Germanio, Italio kaj Japanio. La burĝaro de la imperialistaj ŝtatoj, klopodante konservi la sistemon, kiu kontentigas ĝian kontraŭsocialisman kaj reakcian strebadon, komencas taktike plifortigi la reformismajn movadojn, kaj enportas konfliktojn ne nur inter la socialistojn kaj komunistojn, sed ankaŭ en la vicojn de la socialistaj partioj mem. Ĝi eluzas la influon de eklezioj kaj religiaj movadoj, por reciproke provoki kaj malfortigi la movadojn batalantajn por sendependeco de siaj landoj, ĝi subtenas la evidentan kaj la sekretan faŝismon kaj pledas por la politiko de blokoj, preterlasante tiajn organojn, kiaj estas la Unuigita Naciara Organizo kaj la TSF. Sian relativan bonstaton ĝi konstruas sur laboro de kolorhaŭtaj nacioj, sur ekonomia ekspluatado de la propra laborista klaso kaj sur financa ekspluatado de fremdaj nacioj. Sur sango de patriotoj, kiuj volas por sia popolo konkeri memstarecon.

Do cent jarojn post la deklaro de la Manifesto pri Komunismo, kiu estas konfesia fundamento de ĉiu marksisto, la unuigita klaso de ĉiuj laboruloj en la tuta mondo, reprezentata per la Tutmonda Federacio de Sindikatoj, staras antaŭ novaj artaĵe amasigitaj baroj, kies celo estas malebligi la pluan unuigan proceson.

Malgraŭ ĉiuj heterogenaĵoj, kiujn oni ĉe la starigo de la Tutmonda Federacio antaŭsupozis, la unuiganta ideo restis netuŝita. La milionoj da laboruloj, el kiuj unuj sin kontraŭ kapitalismo defendas, aliaj kontraŭ ĝi akre batalas kaj aliaj fine ekiris la vojon al nova socia ordo, estas konvinkitaj pri sia forto kaj kun certa timo observas la intertraktadon de kelkaj reprezentantoj de la sindikata movado, kiuj, farinte elekton inter la tendaro demokrata kaj kontraŭimperisma kaj la tendaro imperiisma kaj kontraŭdemokrata, decidiĝis por la lastenomita.

La organizita anaro de la sindikataj organizaĵoj aliĝintaj al la Tutmonda Federacio de la Sindikatoj formis ĝis nun mason de pli ol 70 milionoj da laboruloj de ĉiuj nacioj, rasoj, haŭtkoloroj kaj konfesioj. Tiu ĉi mirinda maso da homoj estas kunligita per kelke da principaj celoj, el inter kiuj organizata batalo por pli bonaj kaj pli justaj labor- kaj vivokondiĉoj estas ideo gvida. La laborista movado havas karakteron internacian, ĉar ĝi estas produktaĵo de internacia kapitalo, kiun ĝi povas efike kontraŭbatali ree nur en skalo internacia. Tiu ĉi masa forto estas reprezentata per organizaĵo, kiu devas montri, kiom la laborista klaso kapablas batali kaj kiel intense ĝi scias defendi siajn celojn.

En la jaro 1945 naskiĝis la plej granda unueca organizaĵo de la laborula popolo en la tuta mondo. La Tutmonda Federacio de la Sindikatoj fariĝis reprezentanto de la unuigita volo de la laboruloj, kiuj unuiĝis en la kontraŭfaŝisma batalo. El la unueco en la batalo kontraŭ la faŝista malamiko elkreskis la unueco en la batalo kontraŭ dumpaca ekspluatado de homo fare de homo. La internacia reakcio klopodis tuj dekomence uzi la malnovan armilon kontraŭ la kunsolidiĝantaj fortoj de la progreso kaj semis reciprokan malkonfidon, suspektemon kaj neunuecon inter la organizaĵojn, kiuj estis formintaj tiun ĉi unuecan kaj unikan internacion de pli ol 70 milionoj de laboruloj. La forto de tiaspeca organizita unuiĝo estas tro danĝera por la imperialismaj kapricoj de kapitalistaj regantoj, kies kolero sin direktas antaŭ ĉio kontraŭ tiuj, kiuj decidiĝis vivi vivon liberan, ne influatan per krizoj, la akompana fenomeno de la malnova socio. Tial la internacia kapitalo elektis du vojojn por frakasi la laboristajn kaj sindikatajn movadojn. Unu el ili konsistis en subpremado de libera organizado de la laborula popolo kaj subteno de kontraŭsocialismaj, kontraŭdemokrataj kaj detruemaj organizaĵoj, per kiuj ĝi klopodis rompi la forton de la unuigita proletaro en landoj, kie la liberigaj movadoj estas subportataj antaŭ ĉio de la sindikatoj kaj de la komunistaj partioj. La alia vojo estis elektita por la propraj landoj, kiuj estas bazo de imperiismaj celoj. En tiuj ĉi landoj premo kontraŭ la laborista klaso estus sekviginta kontraŭpremon, kiu estus manifestiĝinta per sociaj skuoj, kiuj povus la regantan klason endanĝerigi, aŭ almenaŭ malfortigi en la batalo por konservo kaj plifortigo de la kapitalismo. En la landoj de la okcidenta kapitalismo, kie oni ĝis antaŭ nelonge operaciis per la devizo de libereco kiel la plej sankta havaĵo de la moderna socio, tiu ĉi libereco estis misuzita por starigado de kontraŭkomunismaj organizaĵoj, kiuj elektis kiel la solan celon por si frakasi la unuecon, por kiu la laborista klaso jam dum pli ol cent jaroj elverŝas sian sangon. Kelkaj grupoj, estrataj de ambiciaj koruptitoj, fariĝis instrumento de frakasemuloj, kiuj disponigis ĉiujn siajn fortojn al eksigo de la Tutmonda Federacio de la Sindikatoj el la gvida pozicio en la batalo de ĉiuj salajrataj laboruloj por la nova socialisma libereco.

La praga kunsido de la Tutmonda Federacio de la Sindikatoj, kiu okazis en la mezo de l'jaro 1947, pruvis nur la ĝustecon de la sinteno de progresemaj gvidantoj de la klaso laborista, kiuj evitis batalan voĉdonadon kaj solvis konsente kun ĉiuj delegitoj de ĉiuj nacioj, haŭtkoloroj, rasoj kaj religioj la plej aktualajn problemojn, kiuj prezentiĝis al la nova organizo kiel al potenca ilo de la paco kaj kiel al la sola parlamento de ĉiuj laboruloj.

Ekde la praga kunsido pasis jam pli ol du jaroj, dum kiuj la reakciaj fortoj sin povis plue organizi. La premo de la internacia reakcio kontraŭ la klaso laborista manifestiĝis en la okcidentaj ŝtatoj antaŭ ĉio sub la pretekst de la Marshall-Plano. La sindikataj organizoj estis misuzotaj por subteno de la plano pri invado de la usona industrio kaj la usonaj bankoj. Ĝi estis invado zorge preparata, kaj ĝi fakte trovis, eĉ inter la laboruloj, kvankam nur sporade, komprenon. Landoj dezertigitaj per la milito, kun detruita ekonomio kaj kun eksterlanda kapitalo interne de si, estis pretaj vendi kune kun sia ekonomia sendependeco eĉ la lastajn restojn de sia nacia fiero, memkompreneble se la popola movado ne ekdefendis senkompromise la naciajn liberecon kaj memstarecon. Kelke da organizaĵoj, sindikataj centraj oficejoj, ofte artefaritaj kaj subtenataj per eksterlanda mono, konsentis pri aparta konferenco, en kiu ili pridiskutis la problemon de la Marshall-Plano, ne ĝisatendinte la vidopunkton de la Tutmonda Federacio de la Sindikatoj. Kiel bagatela estis tiu ĉi kunveno, evidentiĝas el tio, ke la lasta kunsido de la Plenuma Komitato de TFS en Romo ne okupis sin pri tiu ĉi problemo kaj ke la rezolucioj akceptitaj okaze de la marshallisma konferenco restis sole rezolucioj surpaperaj, kies valoro estas problema, ĉar ili kontraŭas la volon de la vastaj popolamasoj, kiu ne estas nura frazo. Tiuj sindikataj organizaĵoj, kiuj kulpiĝos pri sklavigo de sialanda industrio kaj pri senlaboreco, mem spertos baldaŭ la sekvojn de tiaspeca politiko.

Kial oni precipe en la lasta tempo pliintensigis la atakojn kontraŭ TFS? La usona industrio vidas sian solan intertempan savon en impeta imperialisma ekspansiemo, en konkero de la eŭropaj merkatoj. Tion celas la t. n. Marshall-Plano. La laborista klaso, kiu devus sur siaj ŝultroj porti la tutan ŝarĝon kaj la devojn rezultantajn el ĉi tiu plano, amasiĝis firme ĉirkaŭ la fortaj komunistaj partioj kaj malfermis defensivon kontraŭ la sklavigado de siaj landoj. Ĉar ne estis eble frakasi la forton kaj organizon de la komunistaj partioj, la okcidentaj imperialistoj decidis diserigi la forton de la sindikataj organizaĵoj. Dank' al la novatempaj reformistoj ilia manovro parte sukcesis. Ĝi tamen ankaŭ helpis senmaskigi la perfidantojn de la klaso laborista, ĝi kontribuis al plifirmiĝo kaj kuniĝo de ĉiuj progresemaj fortoj. Por ke oni povu tiun ĉi fronton de la progreso ataki laŭsisteme, la reformistoj nun organizas internacian frakasan institucion, kies celo estas daŭrigi la fatalan politikon de la Dua Internacio. Ĝi devus la laboristan klason forturni de politika batalo, ĝi devus al la nova faŝismo havigi potencon. *Ju pli multe proksimiĝos la eksplodo de ekonomia krizo, des pli multe intensiĝos la strebado de la reformistoj frakasi la tutmondan unuecon de la laboruloj.*

La taktiko de la usonaj imperialistoj kaj sindikatoj por varbi la eŭropajn laboristojn por la Marshall-Plano havis ĝis nun kvin fazojn. La bazan pozicion por plifaciligi la laboron de la usona reakciularo havas la britaj sindikatoj. La „TUC" posedas bonajn personajn kaj aliajn interrilatojn kun la sindikataj asocioj de Eŭropo, kaj la famo de la plej malnova ĉi-speca organizaĵo garantias al ties ĉiu agado certan seriozecon. La agentoj de la usona imperialismo en „AFL" konsciis tion kaj koncentrigis tial sian penadon unuavice sur la britan Sindikatan Konsilantaron. Pro tio devis la propono pri la kunvoko de sindikataj kunvenoj el la Marshall-ŝtatoj esti iniciatita de „TUC", pro tio devis la atakoj kontraŭ TFS esti

direktataj unuavice de britaj reprezentantoj, pro tio devis la starigo de fakaj departementoj esti malebligita ĝuste de Deakin, kaj pro tio devis la postulo pri ĉesigo de la agado de TFS esti formulita de britaj sindikatanoj.

Ĉe ĉiuj ĉi provoj pri diserigo de la sindikatoj sur la internacia areno evidentiĝis, ke la marshallismigo de la



*Evžen Erban*
*Generala Sekretario de Revolucia Sindikata Movado en ĈSR kaj la Ministro por Laboro kaj Sociala Prizorgo.*

## DISKURSO DE LA MINISTRO EVŽEN ERBAN

La Ministro por Laboro kaj Sociala Prizorgo kaj Generala Sekretario de Ĉehoslovaka Sindikata Movado Evžen Erban oratoris en la Dua Ĝenerala Kongreso de Sindikatoj en Prago. Komence li akcentis la venke finitan batalon pri la unueco de l' ĉehoslovaka laborista klaso. Unuavice la ĝisnunaj historiaj venkoj de la internacia laborista klaso, kaj precipe la venko de socialismo en Sovetunio, ebligis la malvenkon de kapitalismo en ĈSR en Februaro 1948. La Sindikata Movado dankas kaj esprimas estimon al la soveta popolo, ke ĝi donis al la homaro, sopiranta pri paco kaj trankvila vivo, kamaradon Stalin, kiu personigas la demokratian kaj pacan penadon de la plej bonaj fortoj de l' nacioj en la tuta mondo. Decidan signifon por la laboro de la ĉehoslovakaj sindikatoj havis la Naŭa Kongreso de la Ĉehoslovaka Komunista Partio en majo ĉi-jare. Ties prezidanto Klement Gottwald resumis en siaj Dek Punktoj la fundamentajn taskojn de la laborularo ĉe la konstruado de socialismo, kaj unuavice akcentis la neceson plenumi la Kvinjaran Planon. La Naŭa Kongreso de la Komunista Partio donis decidan iniciaton al la evoluo de la laborsturmula movado kaj socialista konkurado. Dum la nuna jaro la nombro de konkursantaj laborsturmuloj kaj laborsturmulaj grupoj kreskis, tiel ke en oktobro konkursis jam 639.000 laborsturmuloj kaj 33.000 grupoj. Okaze de la Tagoj de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco kaj la Dua Ĝenerala Kongreso de Sindikatoj multaj uzinoj anoncas jam la plenumon de l' unua jaro de la Kvinjara Plano. La produktosukcesoj ebligis al la ĉehoslovaka registaro ankoraŭ pli efike praktiki la politikon de plialtigado de la vivonivelo de la laborularo. La nombro da varoj en la libera merkato konstante kreskas kaj la prezoj estis jam dufoje malaltigitaj. ĈSR kontribuas per sia honesta parto al la historia kontraŭstarigo de du diversaj sociaj kaj produktaj ordoj, el kiuj unu estas konstruata surbaze de ekspluatado kaj senlabora profito, sed la alia surbaze de solidareco de la laborularo. ĈSR estas dank' al la venko de la laborista klaso kaj sukceso de la planata ekonomio kaj ekonomia kunlaboro kun Sovetio senigita de ekonomiaj krizoj kaj senlaboreco, kiu ĉiam pli multe minacas la vivonivelon de la laboristaro en kapitalistaj landoj. La Ĉehoslovaka Sindikata Movado ĉiam subtenas la Tutmondan Sindikatan Federacion kaj ĉiun internacian movadon de la solidareco de l' laborularo. La internacia kapitalismo ne havas sufiĉan forton por detrui la Tutmondan Sindikatan Federacion kaj la sindikatanoj el Ĉehoslovakio kaj el la ceteraj landoj en nombro de pli ol 70 milionoj da organizitaj membroj plue intense subtenos la Federacion, kies ĉefa tasko estas batali por paco, plifortigi la sindikatan unuecon kaj demokratan rajton kaj liberecon de la laborularo. En la tempo de pli forta provokado kontraŭ Sovetio kaj la popol-demokratioj aŭdiĝis decidemaj voĉoj de la gvidantoj de konscia proletaro el Italio, Francio, Anglio kaj el aliaj landoj: Ni neniam batalos kontraŭ Sovetio, ni neniam batalos kontraŭ tiu, kiu alportis la plej grandan oferon en la kontraŭfaŝisma milito. Ni ne batalos por la intereso de imperiistoj. Fine la Ĝenerala Sekretario de la Sindikata Movado Evžen Erban turnis sin en la nomo de l' sindikatanoj en ĈSR al la laborula popolo en la tuta mondo: Ni komune mobilizas ĉiun forton por batalo kontraŭ tiu, kiu deziras sangoverŝadon inter la nacioj kaj detruon por la tuta mondo. Ni senmaskigas ĉiun militprovokanton, ni protestas kontraŭ ties freneza armado, ni malhelpas kontraŭpacan instigadon.

sindikatoj renkontas nevenkeblan reziston de la fortaj sindikatoj francaj („CGT“) kaj italaj („CGIL“). Ĉar ne estis eble entrudi ilin en la planon pri dupartigo de la laboristoj, „AFL“ sentis sin devigita trovi almenaŭ pli malgrandajn organizaĵojn, kiuj akceptus tiun ĉi programon. En Francio disponigis sin L. Jouhaux, helpe de kiu la franca laborista klaso estis entrenota sub la influon de la reformistoj. La provo tamen malsukcesis kaj Jouhaux varbis nur malplimulton, kiu perdas ĉiutage pro necedemo de la franca registaro koncerne socialajn problemojn pluan nombron da membroj. Same malsukcesis la provoj pri diserigo de la italaj sindikatoj, en kiu troviĝis nur malgranda areto da kristanaj sindikatanoj, vane serĉanta membrojn por laŭplana organizo. Provokoj celantaj dispartigon okazas ankaŭ en la belgaj sindikatoj, kie la social-demokratoj praktikas tian politikon, kia estas por ĉiu progresema sindikatano neakceptebla. Situacio por „AFL“ plej favora estas en Okcidenta Germanio, en la konservativaj landoj de Skandinavio, en Svislando kaj Aŭstrio kaj en la Internacioj, kie la sindikatoj troviĝas ankoraŭ sub gvido de perfiduloj bone sin reciproke komprenantaj.

La plej grandan baron sur la vojo de la reformista politiko prezentis la unueca internacia organizo de laboruloj. La „AFL“ povis malfacile atingi sian celon, ĝis kiam la alia usona sindikata organizaĵo, la „CIO“, montris al la usonaj laboristoj ekzemplon de internacia solidareco per laboro en la TFS, kiel tion „CIO“ faris en la unuaj monatoj de la ekzisto de TFS. La defendo de la TFS-politiko fare de la Kongreso de la Industriaj Organizaĵoj („CIO“) estis la sola kolizio inter ambaŭ organizoj, kiu baris ilian kunfandiĝon. „CIO“ tamen baldaŭ atingis la nivelon de „AFL“ per siaj ĉi-jaraj atakoj kontraŭ la politiko de TFS, al kiu ĝi volis altrudi la Marshall-Planon. La situacio do pliklariĝis, kaj „AFL“ proponis al „CIO“ kunfandiĝon de ambaŭ organizaĵoj por la prezo de komunaj klopodoj por detruo de TFS. La ŝanĝo de la „CIO“-politiko estas memkompreneble tre faciligita per la ŝanĝita sinteno de la britaj sindikatoj. Kontraŭe la strikoj de usonaj deŝarĝistoj, parte pro simpatio kun la francaj strikantoj, atestas, ke eventuala eksiĝo de „CIO“ el TFS ne signifus perdon de solidareco de la usonaj laboristoj.

Se la fina celo de la reformistoj estas kunlaboro kun la kapitalistoj, la repacigo de la klasaj kolizioj, kaj ne ilia solvo, ne surprizas la fakto, ke ili uzas en sia taktiko komunajn organojn de laboristoj kaj de labordonantoj. La realigado de la Marshall-Plano ja ne estus ebla sen interkonsento de tiuj ĉi du klasoj. Tre peniga estas ĉi-rilate la situacio en Anglio, kie la dirita interkonsento estas endanĝerigita per la prisalajraj postuloj de la brita laboristaro. Sub preteksto pri raciigo de la brita industrio oni tial starigis brit-usonan komitaton de sindikatanoj (4 usonaj kaj 6 britaj) kaj industriistoj (4 usonaj kaj 6 britaj). Rezultoj de ties laboro estas jam evidentaj: propono pri punaranĝoj ĉe malbona labormoralo, penetrado de usona kapitalo en Brition, kaj pliintensigo de kontraŭkomunista kampanjo. Tiu ĉi lasta punkto estas speciala postulaĵo de la usonaj imperialistoj kaj sindikatanoj ĉe disponigo de la Marshall-helpo. Kontraŭe oni bonvenigas aliĝon de ĉiuj reakciemaj fuĝintoj al reformistaj sindikatoj, kie ili estas edukataj kiel agentoj kontraŭ unuopaj sindikatoj, precipe kontraŭ tiuj en ŝtatoj popol-demokratiaj.

La postulo pri starigo de reakcia internacia centra oficejo de sindikatoj estas logika konsekvenco de la tuta politiko de la reformistaj sindikatanoj. Iniciatis ĝin sekretariejoj de la Internacioj. Jen kia estas la senco de la eksterlandaj informoj de „AFL“ pri tio: laŭ iniciato de „ITF“ (International Transport Federation) konsentis la „ITS“ (International Trade Secretariates) starigi kunordigan komitaton, kiu nun preparas premisojn por efika, se eĉ ne formala, federacio de ĉiuj sekretariejoj. Tiu ĉi organo havas laŭ la opinio de „AFL“ pli gravan internacian karakteron, kaj onidire ĝi funkcias sur multe pli vasta tutmonda bazo ol la TFS.

Pli konkrete formulis la diritan postulon unuafoje la belga asocio de vestindustriaj salajruloj, kiu en septembro esprimis la deziron, ke la belga sindikata konsilantaro eksiĝu el TFS kaj ke en kadro de la nova Internacia Sindikata Federacio, starigota de la „liberaj“ sindikatoj, oni starigu ankaŭ federacion de eŭropaj sindikatoj, kies tasko estus gvidi la eŭropan laboristan klason en ĝia batalo por eŭropa ekonomia unio. Oni volas aserti, ke bezoneco de tiaspeca organizaĵo evidentiĝas ĉiutage pli klare, ĉar ĝi estas la sola rimedo por defendi la okcidentan Eŭropon kontraŭ plena bankroto kaj kontraŭ eventuala invado de la „rusa diktatoreco“. Kaj sekve merkrede, la 19an de januaro 1949, forlasis la brita, usona kaj nederlanda delegitoj la kunsidon, por pli ĝuste diri, la prezidanto de TFS Deakin kun ambaŭ vicprezidantoj. Jam antaŭe ili preparis frakcian konferencon, kiu okazis en Berno. La intertraktadoj de „CIO“ kaj „TUC“ ne skuos la forton de la internacia proletaro. La TFS ne ĉesis ekzisti, male, ĝi kreskas. Kiom ĝi perdos rilate al la nombro da membroj, tiom ĝi gajnos koncerne la forton, viglecon kaj la politikan maturecon. Ĝia pordo restas malfermita por ĉiuj, kiuj sincere deziras batali por justa socia ordo, por la paco. La grupo da perfiduloj vegetos el kapitalistaj almozoj ĝis tiam, ĝis kiam ĝi estos kapabla per sia demagogio delogi la laboristan klason sur la vojon de siaj egoistaj interesoj. La Marshall-Plano ne fariĝis tombo de TFS, sed ĝi certe fariĝos tombo de ĉiuj sindikatanaj perfiduloj, la reformistoj.

Ĉe sia kontraŭprogresa militiro la reformistoj forgesas unu aferon: La klasbatalo ne estas rezulto de la komunista politiko, sed kontraŭe: la komunistoj estas rezulto de la klasbatalo. Ne estas eble forigi la plej bonajn batalantojn el tiu ĉi batalo, kaj samtempe venki. Tion oni devas konsciigi al si ĝuste nun, kiam por la afero de TSF laboras dek milionoj da sindikatanoj kun la Plenuma Oficejo (Executive Bureau) de TFS kaj ĝia Plenuma Komitato (Committee) de TFS.

## A. ZÁPOTOCKÝ — DRAMATURGIISTO

Antaŭ kristnasko aperis sur la ĉs. libromerkato la romano de la Ĉefministro Antonín Zápotocký, titolita „Novaj batalantoj aperos“, kaj ĝi havis meritan sukceson ĉe legantaro. El tiu romanforma rememora scenserio el la fino de pasinta jarcento pri la komenco de la laborista movado la nuntempa leganto povis fari al si klaran kaj veran imagon pri la tiel nomataj „oraj tempoj“, kiuj estis por laboranta homo peza tempo de subpremo. Laŭ la iniciato de la Teatro de Laboruloj en Gottwaldov, oni dramigis tiun ĉi romanon, aŭ, pli ĝustadire, sur ĝia bazo naskiĝis nova teatraĵo, kiun verkis Jaroslav Nezval en kunlaboro de l' kolektivo de la teatro. La pasintan semajnon la aktoroj el Gottwaldov venis al Praha, por prezenti tiun teatraĵon antaŭ la membroj de l'Registaro, antaŭ plej bonaj laborsturmuloj kaj reprezentantoj de kulturo. La interesa teatraĵo konsistas el ses bildoj, prezentantaj la bildon de klasa apartiĝo en la ĉeĥa kamparo en la naŭdeka jaro de la pasinta jarcento. Unuflanke nevidebla bienposedanto kaj ties fidela servanto, administranto de bieno, kontaktanta kun la popolo, kaj sukerfabriko, kie la laboristo dependas de la plaĉo de posedanto, kaj aliflanke proletoj peze laboregantaj por almozula salajro. En tiu tempo de evoluiĝanta kapitalismo la klasaj diferencoj pliprofundiĝis, eksplùatado ĉiam pli kreskis kaj la anoj de la sama nacio estis sociale dividitaj en du malamikaj tendaroj. En malgranda vilaĝo Zákolany, la laboristoj el bieno loĝas kiel ĉie en kamparo en komuna loĝejo. En ĉambro, kie sen ia ajn komforto kaj higieno dekoj da familioj kun infanoj dormis sur pajlo, komune manĝis kaj vivis. Tiam oni pli zorgis brutaron ol homan laborforton. Familia vivo, kiun la burĝa socio tiamaniere aranĝis, estis tie por la objektiva situacio sen privateco, kaj tial ĝi estis deformita. La plej intimaj rilatoj de l' homoj okazis tie publike, kaj la rilato inter viro kaj virino estis pro tio influata de ekstera cirkonstanco. La unua bildo konigas nin kun la loĝantoj de l' komuna loĝejo. Komence ni vidas aron da homoj, egale ĉifonvestitaj kaj koleraj, sed poste ni ekkonas unuopajn personojn, iliajn karakterojn kaj individuajn sortojn. Inter ili aperas tajloro Ladislav Budečský, la patro de Antonín Zápotocký, kun sia familio. Li estis malliberigita pro sia socialista agado kaj poste elpelita el naskiĝokomunumo. Oni konas lin laŭ la nomo „socialisto“, pastro averte citas lian nomon en siaj predikoj kaj preskaŭ ĉiu loĝanto de Zákolany kaj eĉ de la komuna loĝejo jam kontraŭatakas lin. Ili imagas, ke venas inter ilin homo, danĝera ribelulo, ne timanta la bienposedantojn, kiu alportos nur malfeliĉon. Gastejmastro Valdek, kiu estas vilaĝestro, kaj patro Souša incitas kontraŭ Budeĉský. La plej granda pozitiva valoro de la teatraĵo estas, ke oni sukcesis en kelkaj bildoj montri, kiel sub la influo de Budeĉský vekiĝas la klasa konscio kaj kiel la homoj ŝanĝas sian rilaton al tiu, kiu defendas la intereson de eksplùatantoj. Komence Budeĉský apogas sin sole sur kelkaj unuopuloj, sed sinsekve li akiras ankaŭ la ceterajn por la ideo fondi laboristan societon, kiu pli poste subtenas ĉe balotado la unuan laboristan kandidaton de la socialdemokrata partio por la regna parlamento, kaj la balota venko fariĝas elirejo de organizita batalo por la laborista rajto. La personeco de Budeĉský estas ankaŭ interesa pro tio, ke tiu ĉi trankvila, serioza kaj modera homo fariĝas gvidanto de sia ĉirkaŭaĵo pro la firmeco kaj ĝusteco de sia politika konfeso, pro la neskuebleco de sia konvinko. Li estas konvinkita, ke ĉiu laborulo devas batali por sia rajto, fidi la solidarecon de ceteraj laboristoj kaj batali kontraŭ tiu, kiu subpremas kaj humiligas lin. Nur la klasa konscio povas fariĝi bazo kaj elirejo por la decida batalo, kiu iam certe okazos. La teatraĵo de Antonín Zápotocký „Novaj batalantoj aperos“, kiu tiel plastike pentras la laboristajn batalojn en la pasinteco, estas valora kontribuo por nia dramaturgio.

## LA ĈEĤOSLOVAKAJ SINDIKATOJ KAJ LA KULTURO

La Revolucia Sindikata Movado kun siaj tri milionoj da organizitaj membroj estas unu el la plej gravaj faktoroj en la popol-demokratia Ĉeĥoslovaka Respubliko.

En ŝtato, kie la popolo definitive forbalais la kapitalistajn eksplùatantojn kaj mem ekregis siajn aferojn, akiras la sindikatoj novan, krean, konstruan mision.


Sub la kapitalista sistemo rekalkulas la laboristo la ĉiusabatan salajron kaj ne scias, ĉu li decidiĝu aĉeti por sia filineto mantelon aŭ por la filo ŝuojn, ĉar ambaŭ objektoj estas same necesaj, sed por eĉ unu el ili ne superrestas mono. Li kalkulas tiel longe, ĝis oni lin senkompate maldungas. Poste li ne plu havas kion kalkuli. Sub tiaspecaj kondiĉoj oni ne povas pensi pri kulturo. La kulturo estas privilegia posedaĵo de la „superaj“ tavoloj. Burĝa poeto verkas, ĉu intence, ĉu senintence, por elektita rondo da legantoj. Laboristo estas por li tro nekulturita. Jen kia estas la eterna rondiro de la kapitalismo! En popola demokratio havas la laboristoj kion manĝi ili havas por kiom vesti siajn infanojn. Ili scias, ke en laŭplana ekonomio neniam ekzistos krizo. En nia lando antaŭ la Februaro ekzistis 400 uzin-bibliotekoj. Hodiaŭ, ne plenajn du jarojn poste, da ili ekzistas jam 5000. Ĉe la bibliotekoj troviĝas legejoj. Fondiĝas legorondoj. Laboristoj kun intereso vizitas teatrojn. Kaj la dramaturgiistoj kaj verkistoj interesiĝas pri la laboristaro. Senpere en la uzinoj oni organizas diskutojn kun eminentaj verkistoj. La laboristoj informiĝas pri la verkado de l' aŭtoro. La verkisto ekkonas la vivon en la fabrikejoj. Inter ili ne plu ekzistas klasaj antitezoj. Ili amas unu la alian, ili apartenas reciproke al si.

La sindikata gazetaro informas la laboristojn pri la plenumado de la Kvinjara Plano, indikas la spertojn de unuopaj laborsturmuloj, laborsturmulaj kolektivoj kaj plibonigantoj, ĝi informas pri la strikoj kaj manifestacioj en la landoj de la Marshall-Plano. La sindikata ĵurnalo Práce (Laboro), jen ankaŭ akiraĵo de la popoldemokratio. Ankaŭ pri kinoteatroj kun mallarĝa filmo, kiujn havigis al si jam 343, montriĝas granda intereso. Tamen la fakto, ke laboruloj legas gazetojn kaj librojn, vizitas kinejojn, teatrojn kaj ekspoziciojn, ne estas ĉefaĵo. Multe pli grava estas la aktiva partopreno de laboristoj en la kulturo. Tre bonrezulta estas la sistemo de laboristaj korespondantoj. En ĉiu uzino troviĝas laboristo, kiu kunlaboras kun la gazetaro. Li skribas pri la laboro de siaj kamaradoj. La laboristaj korespondantoj interŝanĝas siajn spertojn en propraj kluboj. En gazetoj aperas versoj de frezistoj ministoj, teksistinoj. La konatan Kanton pri Gottwald ne komponis profesiulo, sed juna laboristino el praga fabrikejo Rambousková.

Grandaj uzinoj havas proprajn presatajn gazetojn, en kiuj havas ĉiu la eblecon esprimi sian opinion pri la labormetodo, kritiki la erarojn de la laboristoj kaj la estraro. La kritikoj estas severaj, kelkafoje eĉ senkompataj, sen hipokriteco, ebligitaj per vera libero, tamen el sub iliaj vortoj, ofte malmildaj, oni sentas, kiel la aŭtoroj estas interligitaj kun sia fabrikejo kaj kiom ili fieras pri ties produktaj sukcesoj.

Oni formas deklam — kaj kantoĥorojn, precipe inter la uzina junularo, kiuj per artista programo pliinteresigas la kunvenojn, vizitas vilaĝojn kaj scias kantigi kaj dancigi la publikon sur la urboplacoj.

Helpas ilin laŭprofesiaj artistoj. La direktoro de la Nacia Teatro kunlaboras kun kolektivo gvidata de diletanto. La direktoro de la ĉefa praga scenejo donas al li konsilojn. Nova societa vivo komenciĝas en la uzin-kluboj. Ilia nombro atingis jam 1500. Kie oni ankoraŭ ne havas klubejon, oni kunvenas post la laboro en la uzinmanĝejoj, da kiuj ĉe ni estas registritaj jam 4263. Tie oni prezentas teatraĵojn, kaj ne nur tiujn el la enlanda repertuaro. En la programo aperas eĉ tutmondaj klasikuloj, kiel Lope de Vega aŭ Shakespeare. Tie muzikas laboristaj orkestroj. Ni havas jam en la uzinoj kelkajn orkestrojn filharmoniajn.



*Rudolf Hromada,*
*kiun vi aŭdadis el Praha sur mezaj kaj mallongaj ondoj, estas unu el niaj plejsukcesaj tradukantoj. Li estas vicprezidanto de EAĈSR.*

## RADIO PRAHA

Ĉeĥoslovakion vi povas aŭdi sur mallonga ondo 9550 kilocikloj (kc) t. e. sur 31.41 metroj kaj sur ondo 6010 kc, t. e. 49.92 m.

Ĉsl. normala tempo validas de la 2a oktobro 1949 = GMT = 1 horo.

*Sur ondo 9550 kc t. e. 31.41 m OLR 3A ĉiudirekta anteno.*

Nia fremdlingva elsendo sekvas jene:

| | |
|---|---|
| 12.30—13.00 | Grekujo |
| 15.45—16.00 | ESPERANTO I. |
| 16.00—16.15 | Bulgarujo I. |
| 16.15—16.30 | USSR I. |
| 16.30—17.00 | Jugoslavio I a) serbe |
| 17.00—17.45 | Jugoslavio II b) slovene |
| 17.45—18.00 | Polujo I. |
| 18.00—18.15 | Aŭstrio |
| 18.15—18.30 | Hungarujo |
| 18.30—18.45 | Rumanujo |
| 18.45—19.00 | Britujo I. |
| 19.00—19.10 | USSR II. |
| | (5 min. paŭzo) |

*Sur ondo 6010 kc t. e. 49.92 m OLR 2A ĉiudirekta anteno:*

| | |
|---|---|
| 19.15—19.30 | Bulgarujo II. |
| 19.30—19.45 | Hispanujo II. |
| 19.45—20.00 | Polujo II. |
| 20.00—20.15 | Germanujo |
| 20.15—20.30 | Francujo I. |
| 20.30—20.45 | Jugoslavio III. |
| 20.45—21.00 | Britujo II. |
| 21.00—21.15 | USSR III. |
| 21.15—21.30 | Italujo |
| 21.30—21.45 | Hispanujo III. |
| 21.45—22.00 | Skandinavio, norvege, dane, svede. |
| 22.00—22.15 | ESPERANTO II. |
| 22.15—22.30 | Francujo II. |
| 22.30—22.45 | Hispanujo IV. |
| 22.45—23.00 | Britujo III. |
| 00.00—00.30 | Hispanujo V. |
| 00.30—00.45 | Jugoslavio IV. |

Kiel vi kaptos nian stacion?

OET (Orienteŭropa tempo) Esperanto I
16.45—17.00 horo

MET (Mezeŭropa tempo) Esperanto I
15.45—16.00 horo, ondo: 31.41 m

OkET (Okcidenteŭropa, GMT-tempo) Esperanto I
14.45—16.00 horo, ondo: 9550 kc

*Simile vi kaptos la duan elsendon Esperanto II:*

OrET 23.00—23.15, MET 22.00—22.15, OkET (GMT) 21.00—21.15 horo ondo 49.92 m 6010 kv. Pri tio kiel vi aŭdas nian stacion skribu al: Radiostacio Praha XII, Stalin-strato Nro 12, Esperanto-fako, Ĉeĥoslovakio. Ni deziras al vi bonan aŭskulton. De vi dependas, ĉu ni ankaŭ venontfoje povos elsendadi. Via P. K. kaj L. multe helpas al nia laboro ĉe la estraro de Radio Praha. Tial skribu ofte al ni!

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo“. Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík.
Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo), Praha, Ĉeĥoslovakio.

KUL